

55 (73)

JULIO/AŬGUSTO 1984

ISSN 0150-5823



Dumonata kultura informilo k esprimilo esperantista
Unu n-ro : 4 FF. Unujara abono kun adresaro : 20 FF
Ĝiri al la poŝtkonto 3371 74 M BORDEAUX profite al la eldonanto :
Cercle amical espérantiste de l'Agenais, F 47340 LAROQUE TIMBAUT

alvokoj al la homa konscienco

Ekde tiu ĉi numero "Laŭte!" entreprenas "felietone" la publikigadon de 6 alvokoj pri "Kodoj de deontologio", iniciatitaj de Johano Pinjero, fondinto kaj prezidanto de A.P.J.R. (Asocio por la Protekto kontraŭ la Jonigantaj Radiadoj), pioniro de la kontraŭnuklea luktado en Francio, kaj kiu jam en la jaroj '50 aperigis en esperanto siajn alvokojn : "Propono de deklaracio por la protekto de la homa digno" kaj "Halto al la Atomismo!".

La celo estas, ke "geesperantistoj kaj E-asocioj en tutmondo libere disvastigu en siaj respektivaj landoj la agojn, kiujn sugestos al ili tiuj alvokoj".

Post kelkaj monatoj la 6 alvokoj konsistigos broŝuron, aparte mendeblan al SAT-Broŝurservo aŭ al A.P.J.R.,

sed ni petas ĉiujn gelaŭtulojn jam de nun pripensi kiel kontribui al la disvastigado de tiuj "Alvokoj al la homa konscienco", kiuj tiel proksimas al la celaro de geesperantistoj, el ĉiu ajn asocio, neŭtrala aŭ neneŭtrala.

Nedubblas, ke multaj gelaŭtuloj estos interesataj de unu, pluraj, se ne de ĉiuj, el tiuj alvokoj. Ni do petas ĉiun interesaton rekte rilati en esperanto kun A.P.J.R. (ĉe : Johano PINJERO, APRI, 80 rue des Noyers, Crisenoy, F 77390 VERNEUIL L'ÉTANG). Krome, kompreneble, **ĉar tiuj tekstoj estas ĉiam plibonigeblaj**, la formulo de "Laŭte!" ebligas al ĉiu abonanto sin esprimi libere en la bulteno pri la enhavo de tiuj alvokoj.

Kribo.

N.B. pri la teksto "TUTE ANTINUKLEAJ" : Universala grupo de personoj kaj asocioj senperfortaj, fundamente, tute antinukleaj. En la 84.02.01, 98 personoj kaj 61 asocioj aprobis tiun alvokon, kies ideo estis diskonigita en la 27a de oktobro de 1980.

AŬTUNA INTERNACIA FERIO-SEMAJNO DE TANEF (Esperanto-Fako de la Naturamikoj)

Ĝi okazos en Strasburgo, de la 17a ĝis la 23a de sept. 1984.

Ĉeesto al kunsido, en la Eŭropa Palaco, de la kongreso de Natur-Amika Internacio kaj bela turisma programo estas planitaj. Esperanto estos la nura lingvo uzata dum tiu ferio-semajno. Restado kaj manĝado en strasburga naturamika ĉaledo (ne hotel-komforta sed pura) kaj la ekskursoj, kostos : 1025 FF. Aliĝlimdato : 14/08.

Pliajn informojn kaj aliĝilojn vi petu de ESPERANTO-MIGRANTO,
67 avenue Gambetta, F 75020 PARIS.

LA ITALA E-KONGRESO TEMOS PRI PEDAGOGIO

La ĉi-jara itala kongreso de esperanto okazonta de la 8a ĝis la 12a de septembro en San Pellegrino (Bergamo) pritraktos jenan pripedagogian temon : "Esperanto : konkreta sperto al internacia edukado"

Universitataj instruistoj pri pedagogio, didaktiko, lingvistiko, sociologio, prelegos pri pedagogia valoro de e-o, pri ĝia utileco kiel propedeŭtika rimedo por lerni fremdajn kaj patrajn lingvojn, pri ĝia efikeco al interfratiĝemo, ktp. Partoprenos la kongreson kiel observantoj ankaŭ spertuloj ne-esperantistaj.

Por aliĝo (senpaga por neitaloj) kaj informoj bv. skribi al :
IEF, via Villorresi 38, I - 20143 MILANO.

Por ricevi ekzempleron de la esperantlingva mapo de Milano (kun dorse la detala priskribado de la plej notindaj konstruaĵoj de la urbo) bonvolu

skribi rekte al : D-ro PINI, ĉe E.P.T., via Marconi 1, I 20123 MILANO.

ANTAŬPAROLO

La ses sekvontaj alvokoj estas la posedaĵo de tiuj, kiuj ilin subskribis, subskribas aŭ subskribos.

Tamen, du faktoj pravigas, ke mi subskribas tiun antaŭparolon :

1. Mi aktivas jam de 1957 por la protekto kontraŭ la jonigantaj radiadoj, kiuj jonigas aparte la atomojn de la vivaĵoj, perturbas aŭ detruas ilian nuklean ekvilibron.

Ĉiuj konas la kuracan uzadon de la X-radioj. La partiklaj radiadoj rezultas de elementoj produktitaj de la esplorado kaj de la nuklea industrio, kaj de la armiloj, kiujn ili ebligas fabriki ; oni uzas same la radioaktivajn izotopojn en medicino, laboratorioj, industrioj, transportrimedoj.

En 1962 mi fondis nian asocion, la A.K.R.D. : asocio kontraŭ la radiologia danĝero, kiu fariĝis en 1966 la A.P.J.R. : asocio por la protekto kontraŭ la jonigantaj radiadoj, kiu celis kaj celas informi la publikon pri la nocivo kaj la danĝeroj de ĉiuj jonigantaj radiadoj.

De iom pli ol tri jaroj, mi proponis al la anoj de A.P.J.R. la projektojn de la alvokoj, kiuj fundamentas la nunan broŝuron. Korespondado kaj internaj bultenoj diskonigis al la korespondantoj iliajn diversajn rimarkojn, kiuj permesis progresivan alĝustigadon de tekstoj. Kompreneble, iliaj tekstoj estos ĉiam plibonigitaj, sekve de viaj rimarkoj. Tiuj, kiuj koncernas tian aŭ alian alvokon estos submetitaj al ĉiuj subskribintoj de tiu alvoko.

Parto el anoj de A.P.J.R. aprobis unu aŭ plurajn el tiuj alvokoj same, kiel personoj kaj asocioj, kiuj ne estas anoj de A.P.J.R.

Personoj aŭ asocioj interesataj pri unu aŭ pluraj el tiuj alvokoj ricevos, en lasta ĝisdatigo la alvoko(j)n dezirata(j)n kaj la liston de la asocioj, kiuj aprobis ĉiun el ili.

2. Mi deziras, ke la ideoj esprimitaj en tiuj alvokoj estu diskonigitaj en ĉiuj landoj kaj mi dankas Profesoron Helmut GOETZ, kiu jam tradukis la alvokon pri kodo de scienca deontologio german- kaj itallingven. La tradukoj en aliajn naciajn lingvojn estas evidente dezirataj; espereble iuj el vi povas petadi tiucele alilandajn amikojn.

Tiuj ses alvokoj, same kiel la antaŭaj rimarkoj de Fraŭlino Geneviva KOSTE, estis esperanten tradukitaj (tradukoj reviziitaj de R. LEVREAUD). Ĉar mi estas esperantisto, mi deziras, ke esperantist(in)oj kaj asocioj de esperantistoj en tutmondo libere disvastigu en siaj respektivaj landoj la agojn, kiujn sugestos al ili tiuj alvokoj.

Dankon se vi sendas viajn rimarkojn, vian aprobon al persono aŭ asocio montrita kape de ĉiu alvoko, se ne al A.P.J.R., 80 rue des Noyers, Crisenoy, F 77390 Verneuil l'Etang (Francio).

Kore via

La 84.03.08

Johano PINJERO
(france : Jean Pignero)
Aktivulo P.J.R.

Rimarkoj rilataj al aro de "DEONTOLOGIAJ KODOJ"

Tiuj KODOJ estas proponitaj al apartaj grupoj;
ili estas destinitaj al la pripenso de individuoj.

La preparado kaj eblo de la atoma milito radikaligas la internaciajn konfliktojn. Tiuj faktoj malkovras ankaŭ, ke la modernaj socioj, unuformigitaj fare de la progreso de sciencoj kaj teknikoj, estas malpli kaj malpli kapablaj transformi siajn rilatojn, krei novajn rilatojn, elpensi sian estontecon kaj malfermi al homa espero kampon por eltrovoj.

La internacia konflikto estas la giganta sumo, sed ankaŭ la modelo de la aliaj homaj konfliktoj, kiuj ŝiras la modernan mondon : konfliktoj inter sociaj klasoj; edukaj, klerigaj, etnaj sistemoj; konfliktoj inter laborsistemoj; ekonomiaj aŭ religiaj konfliktoj; blinda impeto al la naturaj riĉaĵoj, daŭra agreso, kiu liveras la vivon homan aŭ bestan al detrua eksperimenta analizo.

Malakceptoj kaj malamikaĵoj trudas sin al ĉiuj niveloj de homaj renkontoj. La militmetodoj estas uzataj ĉie kaj de ĉiuj por certigi la triumfon de iu rigida amasstrukturo malprofite al alia. Sociaj klasoj, sindikatoj, politikaj partioj, trudgrupoj, edukaj sistemoj starigas unuj kontraŭ aliaj per alfronto, en kiu la zorgo plifortiĝi kaj konservi la venk-eblon en la ofensivo kaj defensivo, ĉiam superas la intereson de la proklamita celo.

Ĉie la totalisma pretendemo faras el tiuj konfliktoj ne batalon por la vivo, sed batalon por la morto, por la pura kaj simpla malapero de aliaj : la aliaj grupoj, la aliaj individuoj. Ĉie, cetere, venko signifas la integradon de maso al alia maso, la abstrakton pli kaj pli nepersonan de la celoj, la frivolecon pli kaj pli malfirman de dezirataj valoroj.

La moderna mondo malvolvis rimarkinde kaj tute originale la povojn de la organizo. La planoj, la abstraktaj kaj ordon-emaj projektoj pri la vivo de individuoj, kolorariaj de la teknika progreso, favoris produktadon, konsumadon kaj demografian kreskadon. Ili provizas tiujn havaĵojn, trudante

al individuoj normajn dimensiojn, kiuj reduktas ilian vivon al plenumo de la ordonoj de grupo.

Suferante tiun redukton de la individuo al la kolektivaj disciplinoj, ni sentas, ke kaptilo refermiĝas super ni. Ni vidas niajn projektojn kaj niajn intencojn misformigitaj de la sociaj strukturoj, kiuj plenumas ilin. La esploristo scias, ke la esplorado mortigas. Fizikistoj, kemiistoj, biologistoj scias, ke la radiadoj, la polucioj, la genetikaj perversoj venenas, infektas, degradas tiujn, kiujn ili estas komisiitaj servi.

La kuracistoj scias, ke la toksa drogo stultigas; la agronomoj scias, ke la buldozo, la kemiaj sterkoj, la pesticidoj ruinigas la grundojn kaj la speciojn, ktp. Ni ĉiuj sentas nin glukaptitaj en la premsonĝo, kiu obsedas, turmentas la homojn jam de kvindek jaroj : ĉu la homaro ne tuj devas pagi koste de sia vivo, aŭ de sia inteligento, aŭ de ambaŭ, la materiajn pozitivajn modifojn akiritajn per la sciencaj kaj teknikaj progresoj ?

Nu, estas ne la organismoj teknikaj, sociaj, profesiaj, politikaj, kiuj povas rompi la kaptilon, forigi la premsonĝon. Tiuj kolektivaj entoj ne liberigos sin mem de la kondiĉoj, kiuj igas ilin fortaj, ordonemaj, gigantaj. La politikaj ideologioj ne denuncos sin mem kiel teknikojn pri persvado destinitaj dissendi kredemon kaj dormon.

Neniam iu administro, partio, informorganismo, sindikato proklamas, ke la ambicio grandigi sin kaj fariĝi pli potenca, estas, por ĝi kaj ĝiaj anoj, principo, kiun ĝi ne povas malobei kaj kiu igas ĝin tiel stulta, kiel potencega. Neniu el ĉiuj, kies egoismo kaj potenco dependas de nia blindeco, klopodos klarigi al ni.

Male, oni ja scias, ke la eraroj de administroj rezultigas multobligon de la oficejoj, ke la eraroj de ekonomiistoj rezultigas multobligon de la planoj kaj planistoj ; oni scias, ke la sindikataj absurdaĵoj senlime generas la detalemajn kontrolistojn kaj multetaĝajn komisionojn.

Oni scias, ke la eraroj de politikistoj rezultigas senkompate severigon de la politika ordo kaj, ke ju pli registaro estas nejusta, kruela kaj senenergia, des pli ĝi estas grandioza kaj senmanke regula.

Senti la naŭzan premon de la fatalo enŝoviĝi en ĉiujn homajn rilatojn kaj devojigi ilin al la plej malbono, akcepti la dekretojn de la premsonĝo ĉar ĉiuj akceptas ilin, fali en kaptilon ĉar estas la homamaso, kiu kaptiĝas, ĉu estas tie la finvorto de la homa inteligento ?

Eblas tion ne kredi. Eblas malfidi la ŝajnan logikon, kiu devigus nin pagi per suferoj kaj detruoj la havaĵojn akiritajn per laboro dum tiom multaj generacioj.

Oni povas malfidi la senkuraĝiĝon, kiu kredigas al ni, ke la homaro estas kondamnita fare de sia propra evoluiga movo. Ĉiu scias, ke se la vortoj "justeco", "saĝo" havas signifon, tio estas, ĉar tiu signifo estis gajnita de viroj kaj virinoj, laŭlonge de nia historio. Gajnita signifo por ke ni uzu ĝin.

En la volo kaj inteligento de ĉiu el ni, de individuoj, kuŝas la energio de la justeco kaj de la saĝo.

Kiam drama situacio, kiel tiu kie troviĝas la nuntempa homaro, glitas mem al fatala terura konkludo, supera potenco povas balai la destinton kiel ombron. Tiu supera potenco estas la prirespondeco, kiun ĉiu prenas mem.

Tio estas la movo de pripenso, per kiu ni konsideras nian vivon kiel proprajon nian, tute ; kiam ni decidis meti signifon, kie ĝi ne ekzistas, kaj justecon, kie oni ne trovas ĝin.

Tio estas nia sola kaj vera forto.

Tio ĉi estas dirita por klarigi, ke tiuj "kodoj de profesia deontologio" ne estas la senkaŭza produkto de utopia revado. Ne temas pri alvoko al la bonvolo de kelkaj estuloj mildaj, konsciencaj, cedemaj.

Petante tiujn, kiuj laboras; tiujn, kiuj serĉas; tiujn, kiuj kuracas; tiujn, kiuj informas; tiujn, kiuj administras, meti sin precize fronte al si mem; petante ilin mezuri la gradon de efikeco de sia verko, la gradon de respondeco, kiun ili havas en la korupto, en la krimoj grandegaj, videblaj aŭ ne, kiuj subfosas la nunan ekziston de la homaro;

proponante al ili en tiuj kodoj specon de kodo tre simpla, kiu permesas al ili juĝi kaj doni al si sian rolon kaj sian lokon en la venenoj, genocidoj, buĉadoj kaj psikaj krizoj, kiuj ruinigas la nunan homaron :

- oni ne serĉas flati bonajn konsciencojn,
- oni ne intencas formi grupojn, kiuj povus postuli parton en la prestiĝoj kaj tondraj postuloj de la partioj,

- oni nur avertas ĉiun uzi sian intelekton por scii kaj sian volon por tion fari.
- Sume, oni donas al ĉiu la okazon ŝpari la ekkriaĵajn prudentaĵojn, kiuj akompanas la malkovron de nova kolektiva malbonfaro.

Se kodo de deontologio estas revo, tio estas, ĉar la realismo ordonas ne esti maltrankviligita de la malbono, kiun oni faras.

Rifuzante tiujn kodojn, la "realistoj" estus liberigitaj el tiu deca konfuzo, kiu nepras kiam iu grava polucio kriigas pri "la malsperta sorĉisto", iu plenefika fuzaĵo igas singulti pri la "genocidoj", kaj iu genetika manovro igas tremi pro rememoro pri D-ro Faŭsto kaj lia kunulo.

Tiuj kodoj ŝparus ankaŭ protestojn pri "la nelacigebla esplorado, malfeliĉe ligita kun kondiĉoj de tempo, plibonigo, kompleteco, kiuj ne permesas eskapi al efikoj bedaŭrindaj sed momentaj..."

Sed, se oni bonvolas anstataŭigi tiujn ritajn gurdaĵojn per unu momento de klarvido, oni ekkonscios, ke tiuj kodoj sin turnas, sin direktas al singularaj personoj, el kiuj ĉiu estas sekrete kaj tute informita pri la vortoj, kiujn ili rememorigas.

Donante tiujn tekstojn por legi ĉirkaŭ oni, al plejeble multaj kaj diversaj personoj, oni ne celas kriigi sloganojn,

oni intencas vekti tiun akutan atenton, kiun ĉiu dediĉas al sia propra destino, la aĵo plej grava, sume, por ĉiu mem. Tiu atento povos havigi al li la memoron pri la grandega teksilo, kie teksigas niaj vivoj, kie la plej granda malbono povas fariĝi la plej granda bono, se ni plene prenas sur nin nian verkon, donante al la tuta homaro la plej bonon el ni mem.

Genoveva KOSTE
(Geneviève Coste)

Sendinto : koordinatoj
de la PERSONO,
aŭ stampo de la ASOCIO

Grupo
"TUTE ANTINUKLEAJ"

Universala grupo
de personoj kaj asocioj*,
senperfortaj,
fundamente, tute antinukleaj

La nuklea energio estas natura fakto ekzistanta en la universo jam de ĝia origino. Sed ĝia freŝa scienca kono estis rapide maskita de la eksterordinara pligrandiĝo de ĝia artefarita produktado, tiel ke, jam de la 2a de decembro de 1942, la nuklea energio estas konfuzita praktike kun sia sola industria produktado kaj ĉiuj konsekvencaj utiligoj, sen referenco pri ĝia origino kaj natura ekzisto. Ni akceptas ĉi tie tiun klarigon.

La donitaĵoj de la ekologio** kaj la celoj de la ekologiistoj estas pli kaj pli konataj en ĉiuj landoj, sekve de la multaj difektoj truditaj al la naturo, sekve de la eloviĝo kaj de la kreskiĝo de la "malsanoj de civilizo", sekve de la fiziologia dekadenco, de la minacoj de tiu dekadenco kaj de morto imputeblaj al iuj aplikoj de iuj sciencoj kaj al iuj industriaj teknikoj, sekve de la eblo de malapero de gravaj grupoj da individuoj per la ĉiuspecaj armiloj de masiva detruo amasigitaj de la regantoj en gravaj landoj, kiaj ajn estu la politika formo de ilia reĝimo, la nombro kaj la graveco de la individuaj liberoj, kiujn la loĝantoj ĝuas reale ĉiutage***.

* Por ni, asocioj estas ĉiuj formoj de grupoj da personoj : asocioj, kooperativoj, sindikatoj, partioj, ktp, deklaritaj aŭ ne, strukturitaj aŭ ne, kiuj zorgas nur aŭ precipe, aŭ akcesore pri ĉiuj aŭ unu el la problemoj de la nukleo.

** Ekologio estas la parto de la biologio, kiu studas la rilatojn de la vivantaj estuloj kun ilia natura medio. Sed ne necesas esti biologo por kompreni la gravecon de la ekologio : estas ĝuste la ekologiaj aktivuloj batalantaj pri biologia agrikulturo, pri maro aŭ atmosfero nepoluciitaj, pri mondo sen nukleo, ktp, kiuj devigis morale la scienculojn malvolvi la studon de ekologio.

*** La franca ĵurnalo "La Mondo", en sia numero de 80.10.26, publikigis la artikolon "Laŭ (franca) parlamenta raporto, la franca nuklea potenco

Estas normale, kaj por ni evidente, ke politika karaktero estu agnoskita al la ekologio, ĉar tiu ĉi estas nature politika, laŭ la nobla senco de tiu termino, kaj ĉiu politiko havas, plejofte, ekologian reefikon. Ĉar la politika praktiko prezentas malsamajn celojn laŭ la partio, la ekologio fariĝinta politika estos agnoskita kiel celo esenca aŭ akcesora. La PERSONOJ kaj la ASOCIOJ subskribintaj la nunan alvokon opinias, ke la ekologia celo estas esenca, sed ili precizigas, ke iliaj agoj por la protekto kontraŭ la malutiloj kaj la riskoj imputitaj kaj imputeblaj al la **NUKLEO** estas kaj povas esti nur parto de la **EKOLOGIA AGADO**. Sed ilia sperto permesas ilin proponi politikon **FUNDAMENTE, TUTE ANTINUKLEAN**, kaj deziri, ke vi aprobu la nunan alvokon favore al ilia grupo, **UNIVERSALA** ĉar la nuklea polucio ignoras ĉiujn landlimojn kaj nocas al la tuta regno tera: minerala, vegetala, animala, kaj al ĝia ĉirkaŭo (radioaktiva polucio de tero, akvoj, atmosfero).

Nia grupo "TUTE ANTINUKLEAJ" ekzistas jam de la 7a de marto de 1982 kiel fakta asocio ne deklarita, kies sekretariecon plenumas provizore la Asocio por protekto kontraŭ la jonigantaj radiadoj. La PERSONOJ kaj la ASOCIOJ, kiuj aprobas la nunan alvokon povas do krome aliĝi al nia GRUPO "TUTE ANTINUKLEAJ"; ili konfirmos sian aliĝon dum la konstitua ĝenerala asembleo, se ili akceptas la statutojn,

estigus nun 20 milionojn da mortintoj kaj tiom da vunditoj dum milito". Ĝi klarigas, ke sekvas deviga malorganizado ĉe la malamikaj naciaj aktivaĵoj. Post 1985, tiuj nombroj atingus 60 megamortintojn kaj tiom da vunditoj. La deputito, kiu raportis tiujn afablajn antaŭdirojn, ne aldiris, ke, ĉar la franca fraporto estas defensiva, Francio estus antaŭe ekstermita de la malamika fraporto ofensiva, kelkdekoble supera (vidi la tabelon de la "Potencoj nukleaj strategiaj kaj taktikan en 1979, paĝon 23 de la verko: "La armiloj de amasa detruo kaj la politiko de franca defendo" (en franca lingvo) de Y. Le Hénaff (n° 79/80 de P.R.I.). Se Francisko Mitterrand, prezidento de Francio, ŝetus la gallan Kokon kontraŭ la moskvan Urson, eble en 1984, mortigonte 40 000 000 kaj vundonte 40 000 000 Rusojn el 270 000 000 da loĝantoj, Francio estus komplete ekstermita dum la sekvanta kvaronhoro. Kaj tiu patriota dialogo povus esti inaŭgurita per salvo de neŭtronaj bomboj. Kaj se tiu milito havus internacian karakteron, pli ol 1 miliardo da mortintoj kaj pli ol 1 miliardo da vunditoj rezultus de uzo de nura duono de la ekzistantaj nukleaj armiloj (Raporto de la "Internacia komitato de ekspertoj en medicinaj sciencoj kaj publika sano", kolektita en 1983. Vidi la bultenon "Protekto kontraŭ la jonigantaj radiadoj", n°96, de la 3a trimestro de 1983).

kiuj ĉi tie estos diskutitaj kaj kiuj komplete klarigos ĝiajn motivojn, celojn kaj agrimedojn.

Iaflanke, PERSONOJ kaj ASOCIOJ jam subskribintaj la nunan alvokon, estas motivigitaj de la konstato pri la graveco de la malutiloj kaj riskoj de la nuklea industrio civila kaj milita. Ili opinias, ke necesas starigi bilancon entutan koncerne ĉiujn avantaĝojn kaj ĉiujn malutilojn de tiu industrio kaj de ties aplikoj. Iliaj malutiloj kondiĉas la estantecon kaj la estontecon de la homaro kaj, en tiu bilanco, ili nombras multe pli ol la avantaĝoj. Konsekvence, la ĉefa celo de la anoj de GRUPO "TUTE ANTINUKLEAJ" estas informi ĉiujn homojn en ĉiuj landoj pri la karaktero entute tre negativa de la produktado kaj uzado de la nuklea industrio; tiu informo devus konduki al **ĜENERALA MALKONSENTO PRI LA NUKLEO** profite al aliaj fontoj de energio. Tiuj aliaj fontoj povas anstataŭi la nukleon.

La PERSONOJ kaj ASOCIOJ subskribintaj konstatas, ke la povoj politikaj, ekonomiaj, industriaj, ktp, estroj de la nukleo, trudis ĝin per perfido aŭ per la potenco de sia polico. Ili plu trudas ĝin per la inerciforto de la plenumita fakto, per la potenco de siaj propagandrimedoj, per la konsento de la grandaj politikaj partioj, kiuj inkludas ĝin en siaj voĉdonoj de la naciaj buĝetoj kaj la partieceo de la gazetaro. Tamen, persvaditaj pri la valoro de SENPERFORTO, ili rifuzas ĉiun fizikan perforton, kiu celas senpere fizikajn personojn aŭ kiuj trafas ilin nerekte.

Ili submetas al via studo jenajn bazajn principojn:

* La PERSONOJ kaj la ASOCIOJ partoprenantaj estas **FUNDAMENTE, TUTE ANTINUKLEAJ** pro tio, ke ili deklaras sian kontraŭstaron al ĉiuj instalaĵoj de la nuklea industrio civila aŭ milita, funkciaj, konstruataj aŭ planitaj, kaj al ĉiuj politikoj pri nukleaj registaraj interkonsentoj (eksporto aŭ importado de teknologioj, de nukleaj brulaĵoj, de radioaktivaj produktoj, kiuj povas utili al nuklea armilaro, de nukleaj armiloj, de radioaktivaj ruboj).

* Ili denuncas la povojn, estrojn de la Nukleo, kiel la unuajn kaj nunajn instigantojn de perforto kontraŭ la loĝantaroj kaj ties posteularo. Tamen, ili mem estas SENPERFORTAJ pro tio, ke ili rifuzas plenumi ĉiujn agojn de fizika perforto vole direktitajn kontraŭ fizikaj personoj aŭ kapablaj atingi ilin nerekte.

* Ili GRUPO "TUTE ANTINUKLEAJ" ne havas kaj ne havos aliajn celojn ol tiujn indikitajn ĉi-supre; ĝi rifuzas sin miksi en la agojn plenumitajn por aliaj celoj eĉ se ĝiaj anoj aprobas ilin, interalie de PERSONOJ aŭ de ASOCIOJ anoj de nia GRUPO.

* La GRUPO "TUTE ANTINUKLEAJ" konsistos el centra grupo kaj sekcioj, fondotaj laŭ la lokaj ebloj kaj la inklinoj de siaj fondintoj. Se ne eblas fondi grupon en iu lando, la tieaj loĝantoj povos partopreni grupon de najbara lando.

* La GRUPO "TUTE ANTINUKLEAJ", dum sia konstitua ĝenerala asembleo, decidis sian nomon, sian socian sidejon, sian agrogramon, tiuj ĉi decidoj estos revizieblaj dum la sinsekvaj Ĝ.A. La voĉdono per korespondo funkcios por ĉiuj aliaj kunvenoj.

* La GRUPO "TUTE ANTINUKLEAJ" rememorigas en ĉiuj okazoj sian pozicion TUTE ANTINUKLEAN.

* La GRUPO "TUTE ANTINUKLEAJ" kreas inter la partoprenantaj PERSONOJ kaj ASOCIOJ reton de informoj kaj de aktiva interhelpo, kiu utiligos eventuale la ekzistantajn retojn de la partoprenantaj grupoj;

* La GRUPO "TUTE ANTINUKLEAJ" priatentos kaj klopodos realigi ĉiujn komunajn senperfortajn agojn.

* La GRUPO "TUTE ANTINUKLEAJ" diskonigos la informajn dokumentojn (verkojn, deklarojn, gazetojn, bultenojn, artikolojn, afiŝojn, ktp) kaj la agojn (demarŝojn, paŝadojn, manifestaciojn, apelaciojn ĉe la justico, ktp) de siaj partoprenantoj en ĉiuj landoj. Tiucele, krom la lingvoj naciaj aŭ etnaj kaj eventuale alilandaj praktikataj kutime de ĉiu el personoj aŭ asocioj partoprenantaj, tiuj ĉi utiligos bezone internacian neŭtralan lingvon elektitan de la konstitua Ĝ.A. aŭ de alia Ĝ.A. poste kunvenigota. Atendante, la A.P.J.R. : Asocio por protekto kontraŭ la jonigantaj radiadoj sugestas tiucele uzi esperanton.

* La GRUPO "TUTE ANTINUKLEAJ" laboros por kora konsento inter siaj aliĝantoj kaj la aliaj asocioj ne partoprenantaj, kiuj adoptas la samajn regulojn de aktiva senperforto, por konigi al ili niajn celojn kaj apliki kun ili komunajn celojn.

Alvoko diskonigita en la 80.10.27
Ĝisdatigo n° 11 : 84.02.01.

La.....
Por la GRUPO T.A. :



Pasis duonjarcento

Antaŭ 50 jaroj, februaro 1934, ni en Francio, dank'al vigla reago de la laboristaro, apenaŭ evitis ekfali en faŝismon. En tiu sama jaro koncipiĝis la popolfrento. Post kelkaj monatoj ĝi naskiĝis, kaj du jarojn poste ĝi triumfis. En printempo 1936, Leono Blum starigis la unuan registaron sub socialista gvidado, kaj post giganta striko la laboristoj konkeris la 40-horan laborsemajnon kaj la dusemajnan salajre pagatan ferion. Tiam multaj nuntempuloj ankoraŭ ne estis naskitaj. Kelkaj memoras pri 1968, sed tio estis alia afero. Majo 1968 estis kultura revolucio, en kiu la junularo postulis liberiĝon el ĉiaj malpermesoj, trudoj, tradicioj kaj tabuoj. Sed tiu postulado estis esprimata iel grince, en nihilisma malgajeco. Majo 1936 estis eksplodo de ĝoja espero, espero pri luma estonteco, dum kiu daŭre pliboniĝos la vivrimedoj kaj la vivkondiĉoj de la proletaro.

Mi iam citis la kanton : "Ni iru renkonte al vivo". Alia tiutempa kanto tekstis jene : "Floro sur la ĉapelo, en la buŝo kanzono, koro kuraĝa kaj sincera, nenio plia necesas al ni knabinoj kaj knaboj por iri al ekstremo de la tero." Tiel la gejunuloj, el kiuj multaj unuafoje ekkonis maron aŭ montojn, prikantis sian ĝojan aspiron al spaca libero, sen landlimaj baroj. Trans najbaraj limoj, same arde vivemaj junularoj, trompigitaj de diktatoraj ĉefoj, defilis en paŝtako, kun nigraj aŭ brunaj ĉemizoj, prikantante la junecon (Giovinezza! Giovinezza!). Trans Pireneoj, parto el la junuloj, varbitaj sub la insignoj de la frankista falango, ĝoje iris al batalo, paradokse kriante : "Viva la muerte!". Sed la "frente popular" ŝajnis triumfonta super la armeoj ribelintaj kontraŭ la juna respubliko.

B★E

BAZA ESPERANTO

ĈU POR, AŬ KONTRAŬ ?

La francaj junaj laboristoj sin sentis liberaj, kaj frataj ne nur kun la hispanaj popolfrentanoj, sed kun ĉiuj samklasanoj en la mondo. Ili aŭdis la laŭtan vokon : Proletoj ĉiulandaj unuiĝu! Ili sin sentis tutmondanoj, terciitanoj.

Kompreneble en tiu movado la esperantistoj ne estis la lastaj. En la reunuigita F.E.T. (Federacio de esperantista laboristaro) blovis freŝa vento de juna vigleco. La FET-anoj kun siaj flagoj kaj banderoloj partoprenis en manifestacioj de la popolfrento, en festoj de la Junulargast-ejoj, amase multiĝintaj. En la malmultekosta "vegetalana" restoracio de strato Mathis en Parizo sonis esperanto grandskale parolata. Tio estis la tempo de junaj SAT-anoj, Ozerée, Bubo, Margareta Aspès, kc. Kaj Lanti, pli-ol-50-jara, ne estis mense la malplej juna...

Pardonu, geamikoj, ke mi allasas min al kutima manio de pliaĝuloj : nostalgie remaĉi rememorojn el la feliĉa pasinteco, el la "bela epoko" de sia juneco. Por vi, kiuj vivas nun en ĝenerale pli komfortaj kondiĉoj, vi tamen retrovas la grizan etoson de la krizaj jaroj 1929-1935, kiam regis senlaboreco kaj malsekureco. Al vi la vivo ne aspektas tiel ĝojiga, kiel en tiu printempo de 1936, en kiu la krizo estis jam forgesita kaj ŝajnis neniam revenonta. Sed ne cedu al pesimismo : vi posedas la plej riĉan trezoron : la junecon. La estonto estas via.

En Francio sub socialista regado (sekvo)

Ĉu mi bone aŭdis ? aŭ ĉu miaj malbonaj oreloj fantaziis ?

Mi aŭskultis nacian radio-elsendon. Jen venis novaĵo : Leĝprojekto de la registaro. La "konscienc-obĵetantoj", kiuj ricevos la rajton fari du jarojn da civilservo anstataŭ unu jaro da militservo, devos pagi tiun favoron per speciala kromimposto. Tiel, ne nur ili kostos malpli al la nacia buĝeto (ĉar ili ne konsumos multekostajn armilojn kaj municiojn), sed ili havigos al ĝi plian monprofiton.

Tia estas la lasta eltrovaĵo. Vere, S-ro HERNU, ministro de la armeoj, S-ro DELORS, financministro, kaj ceteraj, meritas laŭdon pri sia inventemo. Brave, kamaradoj ministroj ! Genie ! Vi trafte aplikas la moton de majo 1968 : imagon al la potenco ! Inter viaj reakciaj antaŭuloj neniu kapablis je tia imago.

Por tion trovi, ja necesis esti socialistoj.

Valo.

Kio devus esti Baza Esperanto ? Ĉu oni devus propagandi ĝin aparte ? Ĉu devus ekzisti aparta emblemo (ekzemple: B*E ?) (ĉar al Baz-Esperantisto oni devus paroli nur en Baza Esperanto, alie ĝili komprenos preskaŭ neniom), ĉu ĉiuj Esperantistoj konsentus limigi sian elekton al la vortoj de B*E, kiam ili parolas al Baz-Esperantisto?

Pri mi mem, mi opinias, ke la disvastigo de B*E estus valora, unue ĉar ĝi eliminis la antaŭjuĝon, ke Esperanto en si mem estas simplega lingvo, taŭga nur por la "stultuloj", kiuj ne sukcesas ellerni sian propran aŭ fremdan lingvon.

Mi firme kredas, ke ĉiu homo inda je tiu nomo povas posedi B*Esperanton sen troa penado. Sed bone posedi Plenan Esperanton estas alia afero, kompreneble, kvankam oni povas mastri ĝin kiel sian propran lingvon, aŭ eĉ pli bone, per dekono de la penado necesa por posedi fremdan lingvon je la sama nivelo.

Tamen, por la simpla interkonigiĝado, turismo, internacia amikeco, ktp, oni ne bezonas studi P.I.V.-on aŭ la verkojn de la Esperantaj literaturistoj kaj sciencistoj : por tiuj personoj B*E estas sufiĉa, do kiel devigi ilin plu studadi? Se ni volas, ke Esp. anstataŭu la kripligitan anglan lingvon nun uzatan en hoteloj kaj internaciaj renkontiĝoj, laŭ mi, ni devas samtempe disvastigi B*Esperanton kiel* ĝeneralan interkomprenilon, kaj Plenan Esperanton kiel* lingvon de l' estonteco, kiun oni povas lerni jam en la nuntempo por kontribui al la pentrado de tiu estonteco per koloroj de paco kaj espero.

...Laŭ mi, ni devus ĉiam substreki, ke B*E estas nur sub-aro de Plena Esperanto, kaj ne estas nek pretendas esti la plena formo de nia lingvo. Ekzemple, tiu gramatiketo "Esperanto en 24 paĝoj" laŭ mi devus esti titolita

* kiel : por diferencigi de "same kiel"

"Baza Esperanto en 24 paĝoj", kaj en la enkonduko oni devus klarigi, ke la facileco de la lingvo aparte valoras/validas por B*E.

Giz el Lamark

Nicole :

Mi ne bone komprenas la kialon de tiu demando. Ĉar devige estas pluraj lingvoniveloj en ĉiuj lingvoj, estas pluraj stadioj en ĉiu ajn lernado. Kaj kiel, kial, por kiu racie, strikte difini Bazan Esperanton?

Jam estas diversgradaj kursoj, lernolibroj kaj ankaŭ verkoj diversnivelaj, kiujn necese oni uzas por lerni E-on.

Komencantoj pli-malpli rapide, lerte progresas, aŭ stagnas. La ĉefa problemo, mia opinio, estas la motivoj, kiuj instigas al la lernado, la uzado, la aktiveco, kiun oni celas.

Sed, kompreneble, necesas ankaŭ, ke komencantoj ne estu malkuraĝigitaj :

- Per tro pedantaj verkoj aŭ paroloj kun malfacilaj dirmanieroj (eĉ en la propra gepatra lingvo okazas, ke tekstoj, paroloj estas tute hermetaj);

- Pro soleco, manko de informoj, de materialoj por progresi.

Necesas, ke ili havu eblecon legi, aŭdi divers-stilajn esprimojn. Ili mem elektos, trovos tiujn, kiuj havas resonadon en ili mem, ĉar kompreno, eĉ lernado, dependas ankaŭ de sensivo kaj sentemo. Necesas ankaŭ, ke ili trovu en sia medio akceptemajn esp-istojn, kapablajn pacience aŭskulti kaj paroligi ilin, kaj kiuj agadas kun ili per kaj por Esperanto.

Tiamaniere la komencantoj iom post iom progresos, iĝos spertaj E-istoj, ne restos eternaj komencantoj.

Plej gravas, laŭ mi, ke ĉiu E-isto altigu la lingvonivelon necesan al lia esprimkapablon ; iom post iom devige li aŭ ŝi progresos.

Por argumentadi pri la valoro, la riĉeco de Esperanto, evidentigi, ke ĝi ne estas kruda kodo, lingvo por mensmalfortuloj, pli ol la dispartigo en B*E kaj P.E, valoros divers-tamaj E-verkoj, laboroj, tradukoj en gazetoj, revuoj, libroj, registradoj, kaj ankaŭ internaciaj renkontoj...

Por mi tiu temo estas "falsa problemo". B.E. aspektas al mi nur kiel (aŭ kiel) referenco, indikilo por mezuri sian propran lingvonivelon, sed eblus diskuti ankaŭ pri la elektita kriterio...

*
* *

SAT-ana Dinana Grupo :

Ni ne konsentas pri la diferenco inter homoj, kiuj parolus bazan-esperanton kaj plenan-esperanton, ĉar estus kontraŭe al la interna ideo de Esp-o. Ni neniam vidis, ĉu en kongresoj, ĉu en staĝoj, ĉu en tendaroj, spertajn esperantistojn rifuzi helpi novan esperantiston.

Sed por lerni esperanton estus bone havi unuan lernolibron, kies vortaro estus tiu baza esperanto, kaj kiu povus esti uzata ĉu en kurso, ĉu por memlernado. Kaj mankas post tiu metodo ankaŭ aliaj lernolibroj sufiĉe facilaj por interesi iom post iom al la legado la novajn esperantistojn, ...ĉar la gekamaradoj devos lerni multe da vortoj poste, se ili volos vere paroli esperanton, ĉar oni ne povas diskuti vere per nur kvincent radikoj.

Ni opinias, ke oni ne devas limigi esperanton al tiu baza esperanto kaj normigi ĝin, ĉar tio estus bona por la mal-amikoj de esperanto, kiuj volus pruvi, ke e-o ne estas taŭga por bone esprimi niajn pensojn.

Ĵansebo :

1000 VORTOJ SUFIĈAS

Mi estas por Baza (t.e. Plejsimpla) Esperanto, pro pluraj kialoj :

1. Ĉiuj rajtas esti alparolataj en **simpła lingvo**. La Esperantistoj pretas sin interhelpi. Ne necese la aliaj. Kaj kiam E. iĝos internacia lingvo, ĝi estos uzata eĉ por neamikaj interŝanĝoj. Estus tiam la sama malegaleco kiel nun pri la usona, inter la spertaj kaj malspertaj parolantoj.

2. B.E. evitigas enigi vortojn en E-on nur pro facileco (tiujn vortojn oni nomas "neologismoj") kaj devigas precize diri aŭ skribi sian penson.

3. Estas agrable vidi sur **unu** paperfolio ĉiujn vorterojn de Esperanto. Kolorigante ilin, oni povas sekvi siajn progresojn pri la lernado de la lingvo.



Tiu ĉi signo signifas :
"Artikolo verkita en
Baza Esperanto"

Mi provis traduki vortojn en 500-vorta Esperanto. Mi konfesas, ke estas malfacile. Oni ne povas paroli pri sentoj aŭ pri lingvo. Male, mi opinias, ke 1000 vorteroj sufiĉas por nefakaj interŝanĝoj. Min amuzis skribi tiun ĉi artikolon bazesperante.

Por lingvo, kio gravas, tio estas ne la multeco de vortoj, sed la taŭga enhavo de la vortserioj (monatoj, bestoj, koloroj, sentoj), en kiuj oni povas elekti la trafan vorton.

Mi proponas al ĉiuj, kiuj estas por B.E skribi artikolojn en ĝi por "Laŭte!"*. Mi proponas al tiuj, kiuj estas kontraŭ, proponi redaktaĵojn laŭ ili netradukeblajn en B.E.

Mi emus aliĝi al klubo de "Bazistoj". Ĉu tio ekzistas? Aŭ krei iun. Skribu al mi la interesatoj.

(J.S.Brilleaud, 7 rue Frères-Lumière, F 92500 RUEIL)

Lilia :

Baza Esperanto kiel nura natura, evidenta, unua lernadetaĵo : JES. (Sed tiam ne necesus nova baptonomo ni simple diru, kiel **Kontakto** : "facila E-o").

Baza Esperanto kiel elstara, sendependa lingvo-sistemo, rolanta kiel oficiala allogilo por ne-esperantistoj aŭ instituciigita apogilo por komencantoj aŭ supraĵemaj E-lernantoj : NE.

Mi bedaŭras, sed kiam oni emas pensi, ke por E-o necesas krei Bazan E-on, oni ŝajnas tiamaniere simple kaj senkonscie konfesi, ke E-o taŭgas nur, ĉar ĝi estas "neŭtrala", kaj ne, ĉar ĝi estas lingvo pli simpla ol ĉiuj ceteraj. Se ĝi ne komplete taŭgas, ni tute simple konsciiĝu pri tio kaj rezignu pri ĝi - aŭ almenaŭ ni rebaku niajn propagandaĵojn laŭ pli sincera kaj vera detaligo de avantaĝoj kaj utilecoj.

Ni amas tro E-on, ĝian fratecon, universalecon, ktp, por perfidi ĝin. Sed ni ĉiamaniere ĝin perfidas, kvankam sub la masko de moderneco pedagogia, igante ĝin simila al la angla kun Basic English, ktp.

Evidente, Ĝiz pravus, dirante, ke ĉiu lernas lingvon ĝis la grado, kiu estas interesa por ŝi/li : turistoj volas scii nur peti ĉambron aŭ ĝentile danki policiston pro afabla informo. Sed ni ne iluziiĝu, ni ne agu false : simpla esperanta



lerno-grado ne estos pli alloga ol simpla Basic English: Baza E-o ne kreos pli grandan esperantistaron (aŭ duon-esperantistaron). Ĉar E-o estas ja unue kaj antaŭ ĉio lingvo, sed - kiel ĉiu lingvo - ĝi havas fonon, enhavon kaj "la celo de E-o estas..."

Tiu, kiu eklernos Bazan E-on (t.e. frekventos la unuan gradon de E-kurso) eble rezignos antaŭ ĝia valoraro, kiu povos aspekti tro ne-realisma, moralisma, utopiaĉa, ktp.

Sed mi ne forgesas, ke la epokoj ŝanĝiĝas. Oni emas scii iom pri ĉio kaj fakiĝi pri ununura io (el kiu oni ĉerpas vivrimedojn). Oni uzas malmultajn vortojn por "ĉion" esprimi, t.e. malmulton, kiu estas pli ol sufiĉa.

Tial oni komprenas kial Baza E-o estos/us inda posteulaĵo de E-o, ĝi duon-floros/us por duon-atingi siajn (sed ĉu niajn?) celojn tiel ke oni povos/us ĉion multobligi kaj daŭre prezenti belan, modernan kaj dinamikan bildon pri IL.

Cetere, 1984 estas taŭga jaro por lanĉi tian furoraĵon, ĉu ne ?...

Mirindaĵoj de la dudekunua jarcento :

La Turo Tri-Esperanto

Tiu tri-nivela mirindaĵo estas jam preskaŭ finkonstruita kaj baldaŭ ekloĝota. Ĝi firme staras sur monteto en la ĉirkaŭaĵo de la fama internacia urbo Esperostelo ; la monteto iom strange nomata "Netuŝebla Fundamento" konsistas el kunpremita tero el ĉiuj mondopartoj, kaj ĝi estas kovrita per densa verdaĵo.

Oni atingas la bazon de la Turo Tri-Esperanto (popole nomata "Kontraŭbabela Turo) per fervojo, veturante sube de la monteto ; la unua teretaĵo, nomata Baza Esperanto, estas nur kvin metrojn super la grund-nivelo. Sur tiu herbe-verda ebena oni vige konstruadas hotelojn por turistoj, modelajn elementajn lernejojn, infanĝardenojn, komputor-programejoj, kaj la sidejon de Lingvokontrolero de Baza Esperanto (L.K.B.E.), por antaŭforigi la danĝeron de eniro en la Bazan Esperanton je vortoj malraciaj aŭ senutilaj por la ordinara interparolo.

(Vizitante la Bazan Nivelon, ankaŭ la loĝantoj de la supraj niveloj devos paroli en la Baza, kiu ja estas la lingvo

de la ĉiutaga vivo, ne de la kulturo).

La dua nivelo, nomata Meza Esperanto, estas stranga etaĝo terasita, malhele verda kiel abi-arbaro.

La plej malalta teraso estas nur unu metron pli alta ol la Baza Nivelo, dum la plej supra estas jam pli ol dek kvin metrojn pli alta.

Kaj ĉar estas malfacile transporti la konstru-materialon tra tiu ŝtupar-etaĝo, la masonistoj jam kromnomis ĝin Peza Esperanto. Ĉi tie efektive oni konstruas kaj plu konstruos la sidejon de la serioz-kultura Esperanto, kie oni prilaboros fakvortarojn, eldonos sciencajn revuojn ; en ĝiaj salonoj oni "konversacios" (ne simple "interparolos") pri elitaj temoj kaj argumentoj kaj-tiel-pluoj. La plej gravaj konstruaĵoj Mez-Esperantujaj estos la nova sidejo de Akademio de Esperanto kaj la Sumera Universitato, kie prelegos mondfamaj sciencistoj kaj fakuloj ; la nomo aludas al la sumera lingvo, kiu longtempe rolis kiel la unua prestiĝa, scienca kaj kultura interlingvo en Meza Oriento : omaĝo al la prapatroj, bondeziro por la pranepoj. Ili loĝos trankvile en la apudaj dometoj, ne ĝenataj de turisto-fluo - ĉar, kompreneble, nur malmultaj turistoj trarampos la ŝtuparojn de la dua etaĝo, kiam la unua jam plene sufiĉas al iliaj bezonoj kaj plezuroj.

Smeralde helas la tria nivelo, nur tri metrojn pli alta ol la supro de la dua ; pro tio Muza Esperanto estas ankaŭ nomata Oza Esperanto, memore de la fabela Smerald-Urbo Oz.

La kromnomo venas de la loĝantoj mem, poetoj kaj verkistoj flugil-plumaj kaj vortozaj, ĵonglistoj de la lingvo, magiistoj de l'rimarto.

Oni konstruos ĉi tie la Muzejon de Esperanto, kie oni povos ĝui la ĉefverkojn de la monda literaturo en origina lingvo kaj en Esperanta traduko, kaj la ĉefverkojn de Esperanto kun apuda traduko en la lingvon de l'aŭtoro.

Ĉe la mezo de la tria etaĝo leviĝas Akvamarina Turo, sur kiu briletas la samkolora templo de l'Senkorpa Mistero, kie homoj de ĉiu aŭ neniu religio povas same sperti profundan senton de paco kaj harmonio, kvazaŭ dronante en la mistika vibro marakvo-kolora. Sub la Templo troviĝas bela kaj intimeca kriptoj, nomata Ĉambro de la Interna Ideo ; oni povas facile atingi ĝin per liftoj el ĉiu el la tri etaĝoj. En la Ĉambro oni povas klare aŭdi la pulsadon de la giganta motoro, kiu vivtenas la tri nivelojn, kaj percepti tra la muroj la varmegon de ĝia "koro".

Kaj en la Ĉambro, kaj en la Akvamarina turo, la homoj de la tri niveloj frate interparolas en Baza Esperanto, kaj severa leĝo malpermesas teologiajn aŭ politikajn disputadojn, kiuj cetere estus tre malkonvenaj al la spirito de Baza Esperanto, kaj al ĝiaj praktikaj eblecoj. Cetere, ĉiuj tri niveloj disponas je vastaj renkontejoj, haloj kaj diskutejoj, kie oni povos elmontri sian kulturon, sian saĝon, sian profundan konon de la vortaro, ktp, al tiuj, kiuj deziras aŭskulti; la nivelo Muza Esperanto jam konstruis plurajn recitejojn tre vizitatajn de la loĝantoj; la atmosfero en ili estas saturita de sonore nebulaj novaj vortoj kaj de tempo al tempo trakurata de sprito-fulmoj, kio tre ĝojigas la indiĝenojn.

Vi povas mem imagi la atmosferon de la prelegejoj de Meza Esperanto, tamen oni asertas, ke ekzistas kelkaj esceptoj! Kaj, kompreneble, en la kunvenejoj de Baza Esperanto senĝene interbabilas homoj de ĉiuj niveloj... ĉar Baza Esperanto estas por ĉiuj!

Ĝiz el Lamark

Jakelino :

Konfeso de malnormulino

Estas por mi malfacile partopreni en debato pri la maniero helpi al komencantoj, ĉar laŭ esperantista propagando mi ne ekzistas : kiam mi trapasis la bakalaŭron, mi kapablis efektive utiligi praktike la tri fremdlingvojn, kiujn mi lernis per tute tradicia maniero en tute banala mezlernejo. Poste, mi iris al la universitato de Clermont-Ferrand por tie studi ĉefe la germanan lingvon, kaj krome la anglan. Kiam profesoro Janton enkondukis Esperanton en la universitaton, mi decidis ĝin lerni. Miaj samkursanoj preskaŭ ĉiuj estis lingvostudentoj, kaj la profesoro estas poligloto. En tiu epoko, la Esperanto-studentoj de Clermont-Ferrand ne havis multajn kontaktojn kun la Esperanto-movado.



Nur jarojn poste, legante libron de profesoro Janton pri Esperanto (noto por franclingvanoj : temas pri "Que sais-je?"), mi eksciis pri la ekzisto de SAT. Mi skribis por peti informon, mi ricevis informilon kaj aliĝilon, mi tuj sendis la aliĝilon. Nur plurajn jarojn poste mi eksciis pri la ekzisto de SAT-Amikaro. Do mi eniris la E-movadon kun tre bona scipovo de la lingvo. Tial estas por mi malfacile taksii la bezonojn de la propagando, kaj la manieron helpi al komencantoj trovi sian lokon en Esperantio.

Aliĝinte al SAT-Amikaro, mi eksciis, ke poliglotoj estas malamikoj de Esperanto, kaj ke la franca sistemo por instruado de fremdlingvoj havas kiel konsekvencon, ke ĉe la bakalaŭro lernantoj tute ne scipovas sin esprimi en la angla. Mi sentis min malkomforta en la movado, ne ĉar mi balbutis Esperanton, kiel estas kutime, sed male ĉar mi ne estis sufiĉe stulta! Tre nervozigis min la propagando : "Se vi estas tiel stulta, ke vi ne kapablas lerni fremdlingvojn, lernu Esperanton". Nu, kion proponas al ni Ĝiz el Lamark? Anstataŭigi tiun frazon per jena : "Se vi estas tiel stulta, ke vi ne kapablas lerni Esperanton, lernu B.E.". Ĉu tio estas progreso????

Do mia unua reago estas tuta forĵeto de B.E., pro jenaj konsideroj :

- homa inteligenteco estas aro de diversaj kapabloj. Ĉe mi, la kapablo lerni fremdlingvojn estas supera al la normalo, sed aliaj kapabloj mankas al mi, ekzemple mi neniam kapablis ludi ŝakon, nek briĝon. Tamen neniu propagandas : "Se vi estas tiel stulta, ke vi ne kapablas lerni briĝon, lernu beloton*". Beloto tedas min, ĉar ĝi estas tro simpla : mi ne kartludas.

- mi persone ne parolas ĝin, sed mi aŭdis pri "Basic English" (baza angla lingvo). Iu diris al mi, ke estas malfacile ĝin paroli : tuj kiam oni volas paroli pri preciza aĵo aŭ pri preciza ideo, la angla vorto por ĝin nomi ne estas en la limigita vortotrezoro de "Basic English", kaj oni devas fari longan frazon por komprenigi, pri kio temas. Ĉu ne estos same en B.E.? Veras, ke pro la strukturo de Esperanto eblas diri multe pli per 500 Esperanto-radikoj, ol per 500 anglaj vortoj. Tamen mi dubas pri la taŭgeco de B.E. por internacia amikeco : amiko estas homo, al kiu oni povas multon diri. Kion oni povas diri per 500 vortoj? Se estas nur "Mi bonorde ricevis vian leteron, mi dankas vin, ankaŭ mi bone fartas, kvankam pluvas", ĉu tio ebligas veran amikecon ?

- anglo ne kapablas paroli "Basic English" : kiam oni konas la precizan vorton, estas malfacile elturniĝi por ĝin ne bezoni. Mi ne certas, ke mi kapablos paroli B.E. kun komencanto.

- ne eblas paroli lingvon sen iam "sin ĵeti en la akvon". Esperanto-lernanto fariĝas esperantisto, kiam li aŭ ŝi aŭdacas diri frazon en Esperanto, anstataŭ daŭre pensi "mi ne povas, mi ankoraŭ ne estas sufiĉe bona". Tiu kuraĝo paroli ne dependas de la kapableco paroli Esperanton : iuj lernantoj, kiuj estas jam bonaj parolantoj en kurso, neniam aŭdacas paroli dum renkonto aŭ kongreso. Male, iuj balbutantoj tuj partoprenas diskutojn. Kutime, tiu, kiu plej frue ĵetas sin en la akvon poste fariĝas la plej bona naĝanto. Se oni instruas al lernantoj B.E-on, mi timas, ke estus ankoraŭ pli malfacile por timemuloj transiri al normala Esperanto. Mi timas, ke estus du pli kaj pli malsamaj lingvoj, kaj ke konsekvence Esperanto malprosperus.

Se B.E. estos akceptita de la kolektivo de normalaj E-parolantoj, mi provos ĝin lerni, sed mi ne scias, ĉu mi kapablos pli bone ol anglo pri "Basic English". Estas same pri mia parolrapideco : ĝenas min paroli pli malrapide, ol mi pensas. Tial la lingvojn, en kiuj mi rekte pensas, mi parolas tre rapide (germano plendas, ke mi tro rapide parolas la germanan). La reagoj de esperantistoj al tiu fakto estas diversaj :

- dum SAT-kongreso oni demandis min : "Jakelino, ĉu ci ne povas paroli malrapide, pro la komencantoj?", mi respondis : "Ne, mi ne povas."... kaj tiuj, kiuj bone konas min, ridis.

- en Germanio oni riproĉis al mi, ke mi parolas tro rapide. Mi respondis : "Mi pensas, ke germanaj esperantistoj parolas tro malrapide." Tio ŝokis.

- en Pollando mi demandis, ĉu estas ĝene por komencantoj, ke mi parolas rapide. Reago de la bonaj polaj esperantistoj : "Estas normale, ke komencanto ne komprenas. Aŭdante vin vigle diskuti kun polaj esperantistoj, komencantoj konstatas, ke eblas paroli Esperanton same nature, kiel la gepatran lingvon, kaj ili konvinkiĝas, ke Esperanto eblas por internaciaj rilatoj."

Do, se mi neniam kapablos paroli B.E., mi tamen povos helpi al Esperanto-propagando tiumaniere.

P.S.: ĉu "kjel" kaj "ĝili" apartenas al la limigita vortotrezoro de Baza Esperanto?

* beloto : kartludo tre populara en Francio

Jean-Claude :

Kvankam ankaŭ mi ne scias, kio estas Baza Esperanto, ĝia supozata facileco, ĝia tuja uzo por la afero plej kutimaj de la ĉiutaga vivo povus esti bonega maniero por malkovri la sendependon, kiun donas Esperanto en la internaciaj rilatoj, la riĉigon alportatan de ĝi en ĉiuj kampoj de persona vivo.

Tiu nova libersento spertata de la uzanto tre probable donos al ĝi guston al pli granda kapablo, do ĝin instigos al pli komplete studado. koncerne min, tion mi spertis, kaj plu spertas.

J.G. :

Mi tute ne bone komprenas, kio estas B.E. Ĉu aro de la ĉefaj radikoj de Esperanto? Sed kiel oni aranĝas tiujn radikojn por formi vortojn kaj frazojn?

En la franca lingvo ekzistas malgrandaj poŝlibroj en la kolekto "Marabout" : "**Mi parolas** la italan, la hispanan, la germanan, ktp" (ankaŭ Esperanton). Ili entenas la vortojn plej uzatajn por la turistoj, kiuj intencas pasigi kelkajn tagojn eksterlande. Tiaj libretoj certe povas utili por peti manĝaĵon en restoracio, ĉambron en hotelo aŭ alian praktikan informon, sed oni ne superas tian fraz-stilon : "Mi voli esti vekita je la sepa matene"! Tio certe estus pli taŭga ol la man-parolado, sed ne ebligas veran komunikadon kun la personoj, al kiuj oni provas paroli.

Por mi Esperanto devas esti komunikilo, nur komunikilo, sed vera komunikilo, ebliganta pridiskuti iun ajn temon, eĉ se foje oni faras kelkajn gramatikajn erarojn! La logikeco de Esperanto ebligas aŭ trovi la taŭgan vorton, aŭ uzi anstataŭan ĉirkaŭfrazon. Ĉiu persono, kiu scipovas legi kaj skribi, povas lerni la tradician Esperanton, se ekzistas la intenco kaj kuraĝo tion fari.

Jam ekzistis projektoj faciligi E-on (kiel **Ido**), kiuj tute ne sukcesis. Kiam mi estis knabo en la lernejo, oni komencis eldoni librojn kiaj "La kalkulo sen peno", kiuj flatis nian kompreneblan pigremon, sed vere ne sukcesis malaperigi la malfacilaĵojn!

Mi timas, ke, volante tro faciligi Esperanton, oni falsos ĝin, sed eble mi eraras, kaj estas pri tiu vidpunkto tradiciulo !

Red. de "Laŭte!" : Nun estas cia vico, Suzanne! Sed bonvolu ekuzi novan paĝon...

Suzanne :

Oni povas sin demandi, ĉu B.E. ne estas perfida propono de fuŝanto de Esperanto?! Ido fiaskis; do oni elektis alian formon (aŭ malsaman rimedon).

Mi tute konsentas pri la vidpunktoj de Jakelino kaj J.G. Mi opinias, kaj esperas, ke la lastan vidpunkton de J.G. naskas ne nur menso de tradiciulo, sed ankaŭ tiu de progresuloj. Ni ne donu al niaj oponentoj pravan argumenton! Esperanton ni ne faru lingvaĉo!! Des pli, ke, konscie aŭ ne, multaj konsideras iun ajn universalan lingvon ne valora, ĉar ĉiu popolo havas apartan spiriton. VALO, en L! n-ro 54 tre bone kontraŭas tiun opinion ("Vi diris : utopio"). Mi ĵus aŭdis en radiodissendo tian opinion, kvankam ne temis pri lingvoj.

Temis pri la interhela generado (t.e. uzi spermon de alia viro ol la edzo, ekzemple). Tiaj intervenoj naskas filozofiajn problemojn, kiujn iufoje oni traktas en internaciaj konferencoj. La parolinto diris, ke la francoj, pli precize, ne simile traktas ilin kiel la aliaj nesamlingvanoj, kaj la francoj ŝuldas tion al la franca lingvo, kiu spegulas ilian spiriton. La interparolinto tuj respondis : Tio estas nebla al universala lingvo.

La plimulto opinius ne utila la lernadon de B.E., ĉar ilia elementa scipovo de fremda(j) lingvo(j) havas la saman rezulton.

Plie, multaj turistoj iras eksterlanden pere de vojaĝorganizoj, kiuj havas siajn tradukistojn (pli ĝuste, interpretistojn). Multaj turistoj estas indiferentaj pri la loĝantoj; nur la vidindaĵoj interesas ilin.

Renkontita esperantistino diris al mi, ke ŝi tre amas la E-stilon de "El Popola Ĉinio" : ĝi estas simpla. Pri "Laŭte!" ŝi ĝin ne amas...Ja, esperantistoj, kiuj en sia nacia lingvo ne interesiĝas pri sociaj demandoj, same ne interesiĝas pri tio en Esperanto.

Multaj homoj, eĉ pri sia nacia lingvo, ne zorgas pri la uzendaj vortoj, t.e. neniam kontrolas en vortaro. Similaj esp-istoj ŝatus B.E-on. Sed ĉu tiaj homoj ne fuŝas la lingvon? Kompreneble, oni atente zorgu pri la pureco de E-o, sed tio ne estu la nura celo... Pri mi, mi lernis E-on nur pro ĝia helpo en la strebado al pli justa, frata homaro. Tiam, mi ne antaŭvidis vojaĝi eksterlanden, nek pere de Esperanto, ĉar mi tute ne konis la movadon, la medion. Mi tute samopinias kiel nia amiko H. Masson; li skribis jenon en la lasta "Parizano" : "Persone mi komplete kaj definitive forlasus

la E-movadon, se la SAT-movado mem malaperus, ĉar ja ekzistas multaj terenoj, sur kiuj oni devas, en la nuna tempo, batali. Por SAT la fina celo ja ne estas esperanto."

EL ANGULETO DE ĴIPANGO

Ĵipango estas la nomo de unu el multegaj insuloj flosantaj sur la maro ekstere de la Azia Kontinento, pri kiu la 13-a jarcenta itala aventuristo parolis laŭ onidiroj el buŝoj de tiamaj ĉinoj, kun kiuj li kontaktiĝis.

Laŭ li, en Ĵipango estas la palaco kovrita per dika oro kaj produktiĝas diverskoloraj perloj kaj aliaj juveloj. Kaj tiea popolo estas blanka, ĝentila, gracia, sed ĝia vivo estas sub idolkultista religimoro kaj, do, unu miksaĵo de nelogikeco kaj diobsediteco, tute kontraŭa al la principoj de kristanismo. Krome, oni manĝas kun siaj amikoj kaj parencoj tiujn homojn, kiuj apartenas al alia komunumo kaj arestite ne povas pagi sian monon kontraŭ danĝero. Ĉio tio ĉi estas tio, kion tiu aventuristo, Marko Polo, aŭdis el ĉinaj buŝoj dum siaj vojaĝoj en la Oriento tiam tute mistera al la Okcidento.

Sed ĉi-foje, legantoj de L! aŭdos kaj de tempo al tempo en venontaj L! frazojn rekte el buŝo de vivanta praido de Ĵipango.

Tamen tiu praido mem pensas, ke tiaj asertoj kiaj en la imagoj de la aventuristo ne ĉiam ne koincidas kun realoj de nuna Ĵipango, se ni anstataŭigas "oro, perloj kaj juveloj"n per "dolaroj", kaj "blanka"n per "ŝajnigi sin blankulo kun fiero diskriminacia al ekonomie kaj teknologie postlasitaj popoloj", kaj "ĝentila"n per "timema al eksterlandanoj, pli ekzakte al blankuloj", kaj "gracia"n per "evitema aŭ mutema al mempretendo por sia identigo", kaj "diobsediteco"-n per "ekonomiobsediteco". Rilate "nelogikeco"-n, ĉi tie oni fieras ĝin en la senco, ke Ĵipango estas la unika lando, kie kiel maniero de interkompreniĝo regas tiel nomata "sento-etoso", des pli densigebla kun ju pli da rilatoj inter du unuoj. Do oni kredas, ke la logikeco de raciŝajna vortokonstruado servas nur al klarigo de io, aŭ raciigo de mempretendo, aŭ trompo, kaj, laŭ sia naturo, ne povas formi veran bazon de interkompreniĝo, finfine tiel solide kiel "sento-etoso". Kiel ĝusta senco de onidiro, ke silentemo

estas oro kaj babilemo estas arĝento, pravas Marko Polo, kiu diris, ke en Ĵipango abundas oro sed ne arĝento.

Rilate la kanibalismojn, tia fenomeno nuntempe akriĝas ne en la formo de hommanĝo, pri kio la aventuristo eraris, sed en la formo, ke mono manĝas homojn. Multaj homoj, kiuj sentas sin pelataj al kontentigo de siaj materialaj deziroj, ĉu pro artifika propagando de monpruntistoj, ĉu pro konkurenco kun riĉaj najbaroj, ĉu pro nura simpleco de monpruntado, kuras al monpruntejoj, ne seriozante pri posta repago pli alta, kio foje kondukas ilin al detruigo aŭ eĉ sinmortigo de ili mem aŭ iliaj familioj.

Tio okazas ankaŭ al junaj lernantoj, kiuj sin trovas devigataj iri al vesperaj kromlernejoj pro admono aŭ konsilo ne nur de siaj gepatroj, sed ankaŭ de instruistoj, surbazita sur la ĝenerala tendenco, ke eniri en famajn universitatojn sole garantias ekonomie pli bonan kaj dignan staton de ilia futuro. Multaj, kiuj ne povas sekvi tion, enfermiĝas en degenerigon kaj konsiderinde da ili forkuras al suicido, kio nun estas grava socia problemo. Vere mono manĝas homojn.

Bone, ĉi tie rapide fininte flatan sinprezentadon de Ĵipango, ni transiru al hodiaŭa temo, pri kiu la arĝenta praido interesiĝas.

*

Lastatempe, sinsekve aperas en ĵurnaloj aŭ semajngazetoj artikoloj pri tradukmaŝinoj. Ĉar unu kompanio de Ĵipango fanfaronas, ke ĝi finfine sukcesis prepari ekvendon de tradukmaŝinoj de la angla al la ĵipanga kaj inverse. Responde al tio, profesiaj tradukistoj esprimis siajn opiniojn en samaj ĵurnaloj. Iuj diris, ke la maŝino baldaŭ deprenos la tradukan laboron de profesiaj manoj kun tiela rapideco kiel kalkulmaŝino de antaŭ 10 jaroj, tre multekosta kaj tro granda por portado, nun progresas al tia formo, enmetebla en poŝon kaj aĉetebla per infana poŝmono eĉ kun pli alta kvalito kaj kapablo. Kelkaj eksterlandanoj, kiuj okupiĝas certe pri tia laboro, indignis, ke la angla traduko de la maŝino estas tre malbona. Kaj ili diris, ke antaŭ ol taksi la maŝinon devas temi pri la lingva kompetenteco de inĝenieroj koncernataj al la angla por la maŝino. Aliuj diris, ke en nuna stadio, se la maŝino tradukas, ankoraŭ specialistoj estas necesaj por finpretigi la tradukaĵon, kaj ke, do, tradukistoj ne timu tian maŝinon; kaj ili aldonas, ke, male, ĝi liberigos ilin de tiaj maŝinecaj traduklaboroj, kiaj tradukoj de formalajtoj

leĝaj, teknikaj, ktp. Mi amuziĝis per tiuj opinioj laŭ ĵipanga maniero, alivorte, mute disputante interne de tenebra profundo de la cerbo. La unua opinio reprezentas ĝeneralan admiron aŭ timon al progresrapideco de modernaj teknologioj jam ne kontroleblaj al absoluta plimulto. La dua, nome, de eksterlandanoj reliefigas la lingvan ŝovinismon, ofte troveblan ankaŭ ĉe ni, ke nur tiuj, kiuj naskiĝis aŭ kreskis tie, kie estas parolata la koncerna lingvo, fine povas taksu kaj kontroli ĝin en la plej ĝusta maniero. Ĉe ni, por ekzemplo, ofte okazas, ke iu eksterlandano, jam lerta je nia lingvo, alparolis al nia samlandano per nia lingvo, sed la lasta respondis, ke li ne povas kompreni la anglan. Temas pri tiu eksterlandano, kiu apartenas al la blanka raso kaj pri la forta antaŭjuĝo en nia popolo, ke ĉiuj blankuloj povas paroli la anglan. Unu manifesto de aspekto inversa de la lingva ŝovinismo, ĉu? Kaj la tria estas, la aŭtoro kredas, la tipa opinio ĉe nia popolo. Cetere, nuntempe ĉe ni vendiĝas porteblaj tradukmaŝinetoj al la angla, kies kapablo estas limigita je simplaj konversacioj jam fiksitaj kaj uzeblaj, ekzemple, ĉe vendejo, hotelo, ktp. Nome, en la indiktabulo aperas la formulitaj frazoj per la butonpuŝo laŭ la bezono de ĝia portanto.

Kial do ĉe Ĵipango oni tiel ofte priokupiĝas pri tiaj tradukmaŝinoj? Ĉu pro nura ebleco de ilia fabrikado, aŭ ĉu pro la konvinko, ke nia popolo estas damne destinata ekde sia naskiĝo al la mallerteco pri fremdlingvoj, aŭ ĉu pro ĝia tradicia hontemo kaj sekve evitemo al la rekta alparolo al eksterkomunumaj homoj? Ĉio tio estus prava, sed la aŭtoro pensas, ke la vera proo estas en ĝia kredo, ke inter Ĵipango, la lando tiel ora kiel sunleviĝanta, kaj, ĉiokaze, la landoj de Eŭropo ne eblas la pervorta interkomunikiĝo tiel facile kiel inter eŭropaj landoj, kie estas parolataj samfamiliaj lingvoj, ĉefe pro la kulturhistoria diferenco, kaj, do, ne eĉ per Esperanto. La aŭtoro mem ĉiam alfrontas barakte al tia demando, sed kun decidemo, ke estas multe pli bone elekti la duan plej bonan rimedon kun la homsanga historio al la espero de tutmonda unuiĝo, ol sindoni al la maŝinlingvo, kiu fine devas obei homan ordonon, malkiel en aliaj sciencaj kampoj, ekzemple, fizika aŭ biokemia, ktp, en kiuj rezultus io tute ne atendita aŭ ne celita, kio kondukus nin al la homara detruo.

skribita de Avia



ĉies voĉo pri ĉio ajn

**Precizigoj pri mia reago al la broŝuroj
de Leo POLAK**

- Jakelino ne estas pseŭdonomo, sed mia vera antaŭnomo. Se Feiko Munniksma estus demandinta Kribon (Christian Baudé, por tiuj, kiuj ankoraŭ ne konas tiun kromnomon), li sciuis, ke mi estas: Jacqueline Lépeix, 82 avenue Jean Jaurès, F 67100 STRASBOURG, Francio.

- kelkaj el la riproĉoj de Feiko Munniksma estus pravaj, se mi prezentus mian tekston kiel recenzon. Nu, neniam mi intencis fari recenzon. Mia teksto estis nur esprimo de miaj propraj konvinkoj, kiujn mi trudas al neniuj, sed kiujn, laŭ la Deklaracio pri Homrajtoj, mi rajtas esprimi. Fakte Kribo demandis min, ĉu mi volas reagi al tiuj libroj, kaj mi permesis al li uzi por tio citaĵon el privata letero al li. Efektive estas la problemo, ke povas legi tiun tekston ankaŭ homoj, kiuj ne legis la verkojn mem. Sed ili nur kulpas, ĉar la broŝuroj aperas kiel suplemento al Laŭte. - pri la fundo de la problemo mi ne pli skribas, ĉar miaj konvinkoj pri la temo estas delonge konataj de la legantoj de "Laŭte!".

Jakelino.

Klarigoj pri la broŝuro "Racia kaj ateista Budhismo"

En la lasta n-ro de L! Gyözö Bedegi aperigis vere laŭdplenan recenzon de tiu broŝuro de mi tradukita antaŭ nelonge. Mi nur dezirus aldoni kelkajn informojn pri mia laboreto kaj pri miaj propraj ideoj.

La originala verko estis franclingva libro "Le bouddhisme gnostique", skribita de Prajñānanda, eldonita de Archè Milano (Italujo) en 1981. Per ĝi, la aŭtoro provis konigi kaj sian vidpunkton pri budhismo, decideme ateistan kaj racian, sed precipe "gnozeman", kaj didaktikan raporton pri la bazaj temoj de tiu doktrino (mi devis plejeble koncizigi

ĝin, konservante la plej trafikajn punktojn), kaj sian kvardejaran spertadon pri tiu disciplino (mi bedaŭrinde preskaŭ ne aludis pri ĝi).

Kiel substrekis la recenzinto, la elektado de esp-aj vortoj respondantaj al sanskritaj estas (kaj estis al mi) malfacila, sanskritaj terminoj esprimas sintezajn ideojn, dum la nunaj lingvoj, ĉefe la eŭropaj, estas pli analizemaj en sia strukturo. Mi provis tamen, uzante kelkfoje neologismojn konformajn al la esperanta vortfarado, redoni precize la enhavon de la nocioj.

Mi ne diskutos, ĉu la budhismo estas ateista aŭ ne. Evidente mi rifuzas kaj apartigas la opinion de la "piuloj", t.e. de la bigotoj, kiuj "diigas" personon... Budho mortis antaŭ 2500 jaroj, neniam pretendis sin dio aŭ trudis iun ajn kulton. Simile, kiel ĝuste rememorigis Hermann Schröder, ĉiu nocio pri iu Kreinto, iu "mastro de la Universo" estas rifuzata de la budhismo. Sed la budhismo agnoskas iun "absoluton", intence nedefinitan, aŭ, laŭ aliaj elstaraj hindaj filozofioj, nur negative, kiel "ne tio, ne tio ĉi" - evidente ne kiel persona dio!. Cetere, la kutimaj okcidentaj "metafizikaj demandoj", ĉu ekzistas Dio, animo, postmorta vivo, estas volonte neglektitaj (eĉ primokataj!) de la budhismo, konsiderataj kiel nuraj dialektikaj babilajoj. Tro multaj homoj dezirus neŝancelotajn certajojn aŭ konkretajn kaj tuŝeblajn idolojn; tiuj personoj ne atendu ilin de la budhismo !

Mi invitas la legantojn/legintojn de la broŝuro konigi sian opinion pri ĝi, kaj ĝenerale pri orientaj filozofioj aŭ disciplinoj.

Thierry FALISSARD.

BOF !

Por reloki la problemon pri la cirklokvadrato sur konvenan kaj de ĉiuj kompreneblan terenon, mi lastfoje ripetas la donitaĵojn de la problemo : nur helpe de liniilo (ne mezurilo!) kaj de cirkliilo streki cirklon kaj kvadraton, kies surfacoj samampleksas.

Tiu geometria problemo estas problemo nur pro tio, ke oni ne scias pri la dimensioj de la figuroj, kiujn oni strekas. Per mezurado kaj kalkulado oni forigas la problemon, sed oni ne solvas ĝin.

Jen la procedo, per kiu oni povas tiamaniere elturniĝi. Ĝi estas nur inversigo de la procedo kutime uzata por kalkuli cirklosurfaco : oni strekas iun ajn kvadraton, ekzemple

kun lateroj dektri centimetraj, kies surfaco do estos : $13 \times 13 = 169$. Ĉar tiu surfaco ekvivalentas tiun de la serĉata cirklo, sufiĉas dividi ĝin per π (3,1416) por ricevi R^2 (kvadratan radiuson) el kiu oni ekstraktas la kvadratan radikon aŭ radiuson : $169 : 3,1416 = 53,794244 = 7,335$.

Nur plu necesas malfermi la cirkilion ĝis tiu dimensio aŭ amplekso, piki ĝin centre de la kvadrato kaj streki cirklon kun plej precize ekvivalenta surfaco. Ĉiuj aliaj procedoj ja superfluas.

Sed tiu procedo neniel estas solvo de la problemo pri la cirklokvadrato, ĉar ĝi uzas mezuradon kaj kalkuladon.

Pro tio, tiu nur geometria problemo estas de jarmiloj oficiale opiniata ne efektivebla.

Spite al tiu plurjarmila opiniado mi, nura manlaboristo, pretendas, ne sen riskoj, ke tiu problemo estas geometrie efektivebla kaj aritmetike demonstrebla, kaj ke la aritmetika demonstrado, kiu ne estas la procedo uzita ĉi-supre, ebligas la geometrian efektivegadon.

Sed demonstri tion ne eblas, ĉar klare montriĝis al la interesitaj legantoj, ke tiu temo estas tabua kaj malkaŝe netraktebla pro la subitaj kaj surprizaj nekomprenebloj kaj silentemo de la fakuloj.

Konsekvence, rilate ties solvon, ĉiu mem plugu sian propran sulkon.

Cetere, tiom da tabuoj kaj dogmoj kondiĉas la ĉiutagan vivon, ke ĉiu rajtas sin demandi : ĉu unu plia aŭ malplia ja gravas ?

BOF !

Anonima B.G.D (EYMET)

N.B. - En mia lasta artikolo (Laŭte n°53) mi uzis sen klarigoto la mallongigon : **reputita**, anstataŭ : reputaciigita. Mi pardonpetas la Legantaron pro tiu forgeso.

KIO ESTOS LA ESTONTECO DE ESPERANTO?

Komence estis iu kuracisto, kiu, kiel scias ĉiu e-isto, kreis internacian lingvon. Zamenhof. Multaj idealistoj el la tuta mondo aliĝis al la ideo de D-ro Esperanto kaj kunvenis por la unua fojo en universala kongreso en 1905. Sekvis multaj jaroj, dum kiuj la batalantoj por la ideo, t.e. la esperantistoj, pli multiĝis, neniam laciĝintaj... kaj poste?...

Ne temas ĉi tie skizi la historion de esperanto, la militojn grave vundintajn, la supren- kaj malsuprenirojn en paca tempo.

Ĉu kiel oleomakulo esperanto tute kovros la tutan homaron?
Ĉu ekzistas aŭ ekzistos senĉesa kreskado? Se jes, ĉu tiu
kreskado ne estas tiel malrapida, ke nur en tempo ege malprok-
sima venos la venko, se ĝi venos?

Kiel ĉiuj esperantistoj, mi opinias, ke necesas serĉi alian
solvon.

1) Ke la internaciaj kaj naciaj instancoj rekonu E-on
kaj ke ĝi estu enkondukata en ĉiujn lernejojn kiel deviga,
dua lingvo. En tiu direkto tio ĝis nun akirita (ekz. ĉe UNESKO)
ne sufiĉas kaj ne esperigas solvon por la estonteco.

2) Ke per interkonsentoj inter esperantistaj kaj naciaj
instancoj esperanto estu pli kaj pli instruata en lernejoj.
Pri tiu dua punkto la francaj esperantistoj multe esperis
de la nuna franca registaro kaj nun senkuraĝiĝas pro la
malplenumo de la promesoj. Tamen, mi opinias, ke ĉi tie
estas ia vojo. Iam en ia parto de la mondo okazos plimultiĝo
de la e-lernantoj kaj des pli bone, se tio okazus en du aŭ
pli da landoj kun malsamaj naturaj lingvoj. Tial la utileco
por interkompreniĝo estos granda.

Sed ni konsideru iujn punktojn. Multaj personoj lernis
iam esperanton, eĉ aktivis en E-asocioj, sed nun ne plu
partoprenas. Se ili iun fojon vojaĝos, ili ne havos sian jarlibron
ktp, kaj ne povos uzi esperanton. En sia lando ili ne estas
troveblaj de vojaĝantoj kaj ankaŭ ne utilos al eksterlandaj
E-parolantoj. Mi renkontis ankaŭ personojn, kiuj entuziasmiĝis
pri nia lingvo, sed ne ŝatis, ke por uzi ĝin oni aliĝu al iu asocio.
Kaj do kio okazos, se multaj gejunuloj lernos esperanton
en oficialaj lernejoj? Oni ne povos devigi ilin aliĝi al asocio,
kaj se ili ne povos praktiki E-on, la plimultaj estos perditaj
kaj la agado estos fiasko.

Oni nun instruas, sen granda sukceso, eksterlandajn lingvojn
en multaj landoj. La lernantoj, kiuj sukcesas scipovi unu
el tiaj lingvoj, povas uzi ĝin vojaĝante en landoj, kie ĝi
estas parolata kaj ankaŭ kun la eksterlandanoj, kiuj parolas
tiun lingvon ĉu nature ĉu per lernado, sed la hispanoj lernas la
anglan kaj ankaŭ la sudfrancoj, ambaŭ sen granda sukceso,
dum malmultaj lernas, sed sukcese, la najbaran lingvon.

Esperanto superos alian nacian lingvon kiel monda kompren-
ilo, kiam kia ajn E-parolanto povos kontakti alian E-parolanton
sen devigo, ke ambaŭ estu esperant-istoj.

Pro tio mi proponas, ke oni faciligu al ĉiu E-parolanto
la eltrovon de alia E-parolanto. Oni publikigu jarlibrojn
entenantajn laŭ eblo kaj laŭ volo de la interesatoj la nomojn

(daŭrigo sur la antaŭlasta paĝo)

laŭtaj informoj kaj petoj



EKOLOGIO :

La 4an kaj 5an de aŭgusto en Creys-Malville

Jen pli da informoj pri tiu grava amaskunveno.

La Renkontiĝo okazos sur la riverbordo vidalvide al la nuklea centralo
(flanke de Ain-departemento). 4 hektaroj estos disponeblaj por la spektakla
parto, 50 hektaroj por la akceptejo kaj tendejoj. Grava, altvalora programo
estas proponita :

Sabaton posttagmeze je la 14a : Alveno de la bicikla konverĝo. Ekde
la 15a : komenco de la oficialaj forumoj. Oni pridebatos multajn temojn
pri la aktualaj nukleaj problemoj :

- interrilatoj de la civila kaj pormilita atomindustrio en Malville kaj aliloke
- atomindustrio kaj socia elekto : dungigiĝado, transoficigo kaj demokratio.
- alternativaj defendsistemoj, alternativaj energioj.
- rolo de atomindustrio en la ekspluatado de la Tria Mondo.
- kontraŭnukleaj agadoj en la orientaj landoj.
- kion fari kontraŭ la atomindustrio?

Projekciado de filmoj kaj muntaĵoj pri diversaj temoj.

Ekde la 18a ĝis la 21a : vizito al la budoj, vespermanĝo. Ekde la 21a :
diversaj spektakloj.

Dimanĉon matene : vizito al la budoj, filmoj, forumoj. Samtempe, la pac-
biciklantoj ĉirkaŭbaros la atomcentralan sidejon de Malville.

Posttagmeze : je la 15a forumaj raportoj kaj tiuj de la multnombraj asocioj.

Estos infanvartejoj kaj akceptejo por la geknaboj.

Prelegoj pri Hiroŝimo finos tiun pacan renkontiĝon.

Se vi interesiĝas pri tiu renkontiĝo, aŭ se vi deziras ĝin helpi, skribu
al : Michel BERNARD, Campagne pour l'arrêt de Malville, 4 rue Bodin,
F 69001 LYON.

Pri la biciklaj "konverĝoj" :

Unu foriros de la **Avignon**-festivalo. La unua simbola
etapo okazos en la Albion-altebenaĵo, alia en St Etienne
des Sorts, loko antaŭvidita por eventuala konstruado de venontaj super-
generatoroj. Poste, niaj biciklantoj sekvos la valon de Rodano, haltos en
lokoj bone konataj de ekologiistoj : Marcoule, Pierrelatte. Ili plu biciklos
en Mirmande (komunumo de H. Tazieff), Valence, Vienne (komunumo
de Louis Mermaz), Villeurbanne (komunumo de Hernu ; antaŭ 1981 Hernu
kontraŭstaris la projekton "Super-Phénix"), Bugey (atomcentralo) kaj fine
atingos Malville. Alia bicikla konverĝo foriros el Verbois (Geneva ĉirkaŭurbo
kie estas antaŭvidita atomcentralo.

Ginette G.

TARN-ESPERANTO

ALBI - Dum la tutjaro 1983, dek lernantoj diligente partoprenis iniciadkursojn gvidatajn de s-anoj Puech kaj Costes. Agrabla bankedo kunigis en majo 1983 la tutan Albiĝanan Esperantistaron. Okaze de tiu ĉi manifestacio, korespondaĵo per kasedo estis interŝanĝita kun S-ano Teddy Löwenkopf el MAAĜAN (Izraelio). S-ano Didier Cazottes el Gaillac, agema membro de Tarn-Esperanto, estis kore akceptita de E-Klubo en Stokholmo. S-ano Viktoro Baniulaitis el Klaipeda (Sovetunio) fariĝis honora membro de Tarn-Esperanto. Agado por Esperanto plu daŭras laŭ la deziresprimo de la ĝenerala asembleo de Tarn-Esperanto (11an de oktobro 1983), kiu decidis:

- malfermon de inikurso gvidata de S-ino Thomas
- interrenkontiĝojn, unu fojon semajne, por pliprofundigi nian lingvan scipovon (Arnaudet). Ne krokodilaĵo !
- propagandon ĉe gazetaro kaj radiostacioj, precipe Radio Sud-Musique (Albi) ĉar S-ano Puech estas esperantisto respondeculo pri tiu ĉi radiostacio.

CASTRES - Dank'al S-ino Nicole Déjean, Tarn-Esperanto malfermis iniciadkurson en Castres. Dank'al la helpo de S-ro Tripiet (Kolegio Jean Jaurès), de S-ro Cros (Direktoro de la Kultura Junuldomo), de S-ano Christian Pons, du kunvenoj estis aranĝitaj en kolegio J. Jaurès. Propagando estis farita ĉe gazetaro kaj ĉe Radio Sud-Musique. Partoprenis proksimume dek entuziasmaj aŭskultantoj. La iniciadkurso (gejunuloj kaj mezaĝuloj) komenciĝis la 26an de aprilo sub la gvidado de S-ano Ch. Pons en la Kultura Junuldomo.

PERPIGNAN

La ĉiujara pikniko de la Kultura Esperantista Centro dimanĉon 19an de aŭgusto en Argelès-sur-Mer. Kiel kutir proponos la tradician "sangria"n en la vilao "Sunradio de la Mer en Argelès-Plage. Oni ne bezonas antaŭvert la tagmanĝon kaj estos sufiĉe da lokoj. Esperantistaj turistoj estos bonvenaj.

ĈE SAT-BROSURSERVO :

Tute elĉerpita estas nun : "Kio estas SAT?" de Henri MASSON. Interesatoj povas tamen mendi ankoraŭ ĉe SAT-sidejo, 67 av. Gambetta, F 75020 PARIS.

Elĉerpita ankaŭ : "Esperanto en 24 páginas" (kastilia).

"Tiel diru!" (de LENTAIGNE) rapide malaperas : preskaŭ 500 ekzempleroj en nur 3 monatoj. Ni konsilas al la interesatoj (ĉefe la E-klubo aranĝontaj E-kursojn ekde septembro) ne prokrasti siajn mendojn, se ili intencas uzi la libron venontan lernjaron!

Restas nur tre malmultaj ekzempleroj el : CM, FF, HM, IS kaj LP. Multaj el la elĉerpitaĵoj ne estos reeldonitaj.

NOVAJ ADRESOJ aldonendaj al la Adresaro "1983"

- Alex HUMET, Terliststr. 12, B 2018 ANTWERPEN
- Robert BURNAY, rue Julien Colson 29, B 5000 NAMUR
- Marcel DE GRAVE, R. d'Houthem 207, B 7780 COMINES (24, laboristo)
- John SYKES, 13 South View, Whitegate Top, HALIFAX, HX3 9JP, Britio
- Osmo BULLER, PL 76, SF 90101 OULU 10
- + Annie DONZ, 1/6 av. de l'Europe, F 02000 LAON
- + Prunelle NOBÉCOURT, 37/9 rue Pierre Curtil, F 02000 LAON
- Pierre LANDARD, Rte de Corréo, La Roche des Arnauds, F 05400 VEYNES
- M. BACCONNIER ALIBERT, Thines, F 07140 LES VANS
- André ROCHER, 2 rue Méjane, F 12500 ESPALION
- Marc HOQUET, 3 imp. Dr. Gressard, F 21000 DIJON (62, studento)
- Claude CLERC, 115 av. Maréchal Lyautey, F 21100 DIJON
- Patrick BRIENT, 14 pl. du Champ Clos, F 22100 DINAN
- Jean CHATEAU, 73 le Domaine, Taden, F 22100 DINAN
- Michel MAHÉ, 13 rue de Champagne, F 22360 LANGUEUX
- + Martine LE HÉNAFF, Cains, F 22690 PLEUDIHEN
- André DELAYE, La Farigoule, Colonzelle, F 26230 GRIGNAN
- + Claudine COULOMB, Ecole J.Macé, 129 r.Tour de l'Evêque, F 30000 NIMES
- René RAYNAUD, 18 rue Ste Félicité, F 30000 NIMES
- + Violette SIGNOVERT, 11 rue Rodrigue Péreire, F 33000 BORDEAUX
- Gilles LAFITTE, Clairière des Aubiers, Entrée 7, apt 235, 33300 BORDEAUX
- + Montserrat CABRAFIGA, rue de la Lande Blanche, F 33320 EYSINES
- + Sabine ARDOIN, "La Billette", Margueron, F 33220 STE FOY LA GRANDE
- + Laura VIEILLEFOND, 39 r.J.Ferry, Pineuilh, F 33220 STE FOY LA GRANDE
- + Nereida MARTINEZ, 8 r. du Tour de l'Eglise, F 34000 MONTPELLIER
- + Anne-Marie ARGNEY, 47 rue du père Lebret, F 35400 SAINT MALO
- Jean-Pierre CAMPION, Ecole publique, F 35132 VEZIN LE COQUET
- + Brigitte LECLESVE, 2 rue des Ecoles, app.39, F 37170 CHAMBRAY LES T.
- Gilles RENOUS, 17 rue H. Dunant, F 64000 PAU
- Michel LEGRIS, F 65330 GALAN (49, komercisto, kolektas E-aĵojn)
- + Carme LLAPART, 17bis, Rte de la Mer, F 66700 ARGELES SUR MER
- Laurent MEYER, 19 rue de la Butte aux Cailles, F 75013 PARIS (49,...)
- Josefo LLOP VILA, La Poulonnerie, Villebéon, F 77710 LORREZ LE BOCAGE
- Johano PINJERO, 80 r. des Noyers, Crisenoy, F 77390 VERNEUIL L'ETANG (14, emerito. \$: antinuklea informado)
- * TARN-ESPERANTO, 3 rue Roquelaure, F 81000 ALBI
- Michel CHALLULAU, La Verda Stelo, 1508 av de la Mer, 83140 SIX FOURS
- + Jeannine COUDERC, Les Pervenches, bd. A.Daudet, F 84130 LE PONTET
- R. DESPUJOLS, Rés. Champ de Mars, F 87400 ST LEONARD DE NOBLAT
- + Claudette CHEBER, 210 av.Brossolette, F 92240 MALAKOFF
- * Roser CAMP de FIGULS, Córuga 515 Atic 1A, BARCELONO 25, Hispanio
- Jesús PÉREZ, Apdo 280, LA LINEA (Cadiz), Hispanio

*Ne estis eraro
en via unua
komuniko!
Annika
Claude*

- Adonis GONZALEZ MEANA, Apartado 242, GIJON (Asturias), Hispanio
- SATO Eiji, Tsukusi-so 6, Kizuki 1414, Nakahara-ku, KAWASAKI, Japanio
- HIGASHITANI Iwahito, 2-2-15 Kohinata, Bunkyoku, TOKYO 112, Japanio
- NAKADA Hisato, Saitoobun-tyo 60, Kanagawa-ku, YOKOHAMA-SI, 221 Japan.
- YAMAGUTI Mitio, Suehiro 9-6, SUWA-SI, 392 Japanio
- YAMAGUTI Kouiti, Nisimarune 121, Oodaka-tyo, Midori-ku, NAGOYA-SI, 459 Jap
- ŜOĴI Makoto, Haitu-Matumi A1, Okuda-matunaka, Mihama-tyo, Tita-gun, Aiti-ken, 470-32 Japanio
- GOTO Syozi, Sironouti 1, Rokuwa, Heiwa-tyo, Aiti-ken, 490-13 Japanio
- ROKUGO Keitetu, Houzyu-haitu 28-18, Monzyu 57-18, Motoso-tyo, Gihu-ken, 501-12 Japanio
- HIRAI Jukio, 4-17-15 Seiiku, Ŵotoku, OOSAKA, 536 Japanio
- OOGUSI Sizuo, Nanba 2-4-14, Minami-ku, OOSAKA-SI, 542 Japanio
- TANI Hiroyuki, Syonai-Higasimati 3-4-6, TOYONAKA-SI, 561 Japanio
- MINAMIYAMA Norio, Takamiya 652-412, NEYAGAWA-SI, 572 Japanio
- MATSUDA Katsunori, Hanazano-honmachi 1-5-33, Higashi-Osaka-shi, OSAKA 578
- IMAI Masaki, Itizaki 2-2-19, Minami-ku, HUKUOKA-SI, 815 Japanio
- TAKENAKA Seitaro, Yokouti 175, OBANAZAWA-SI, 995 Japanio
- x J. kaj H. RALEY, Rochussenstraat 133c, NL 3015 EJ ROTTERDAM
- A. NOORDEWIER-JAGTENBERG, Kon. Emmalaan 7, NL 3832 AH LEUDEN
- * Laborista E-Klubo, Bärhusgatan 8 ög.n.b., S 111 23 STOKHOLMO
- Hans NORDEBÄCK, Kavaljerstigen 4, S 162 35 VÄLLINGBY
- Sten LINDGREN, Bergsätträvägen 34, S 184 00 AKERSBERGA
- Ingmar HÅKANSSON, Albert Hennings väg. II, S 291 46 KRISTIANSTAD

Adresoj ~~forstrekdaj~~ forstrekdaj

RAPLEY (Britio), CHEVIN (F 29), LAFITTE (F 33), BARONNET (F 36), LANDARD (F 80), DELAYE (F 84), DESPUJOLS (F 87), GONZALEZ MEANA (Hisp) LLAPART (Hisp), PEREZ (Hisp), UNOKI (Japanio), HIRAI (573 Japanio)

Adresoj modifendaj

- * Cl. STAQUET (Brusela Grupo), Rue du **Loutrier** 14, B 1170 BRUXELLES
- x G. YVON & C. PALIOT, 10 av de la **Résidence**, F 94260 FRESNES
- TUBOTA Koki (sama adreso) en 458 Japanio
- + Inge de BRUIN, Hankemaborg 36, NL 7608 DH ALMELO

Personaj informoj aldonendaj

THUMERELLE (Belgio): 49, instruisto. Mc CALLUM (Skotlando): 47, juristo, ŝ: komputiloj, lingvoj. CARDONA (F 22) : 49, bus-ŝoforo. t:(96)31.44.58
 BEZOMBES (F 47) : ŝ: fot, ĝarden, laboreti, koresp. LEHALLE (F 57) : 53, bredado-konsilanto. ŝ: ŝakludo. POUPEAU (F 77) : 50, teknikisto. ŝ: ontologio, ŝako
 COSTES (F 81): 35, PTT. IZACARD (Germanio) : 55, librovend. ŝ: leg., vojaĝ.
 ENGHARDT (Svedio) : 28, redaktoro. ŝ: vojaĝoj, reformi E-on.

(ĝisdatigo de junio 1984)

KIO ESTOS LA ESTONTECO DE ESPERANTO?

(daŭrigo de p.32)

de ĉiuj personoj scipovantaj e-on.

Tiu tasko estas farota de la E-asocioj. Ne temas pri iu monda jarlibro eĉ ne nacia, sed pri pluraj jarlibroj laŭ regiono kiel telefon-jarlibro. Laŭeble kaj nepre en okazo de interkonsento kun registaroj pri instruado en lernejoj, tiuj jarlibroj estos je publika dispono venditaj je plej ĝusta kosto kaj konsulteblaj en publikaj lokoj.

Komence, se mankas la mono, la E-asocioj povas publikigi ilin anstataŭ aliaj propagandiloj. Kiel pli bone propagandi, ol faciligante la kontaktojn de E-parolantoj?

Tiu ĉi organizo estos konstruo montranta la efikon de esperanto por konvinki ŝtatajn instancojn lernigi E-on kaj oni petu helpon de tiuj instancoj, por ke tiuj jarlibroj estu troveblaj en multaj lokoj.

En multaj landoj preskaŭ ĉiu homo disponas pri telefono, la nomon en jarlibro povas sekvi telefonnumero, tiel vojaĝanto povas kontakti E-parolanton surloke kaj tiu ĉi povos laŭeble doni informon aŭ rendevui.

L.A.

RTL - AGADO - RTL - AGADO - RTL - AGADO - RTL -

Je la fino de 1985, RTL (Luksemburga Televido) elsendos per satelito kaj eblos kapti ĝiajn programojn en dudeko da eŭropaj landoj. Nun la estontaj programeroj estas pritraktataj. Sekve, estas tempo por SENPROKRASTE kaj AMASE sugesti al la RTL-estraro regulan programeron ankaŭ en Esperanto, ĉu monate, ĉu eĉ semajne.

SENPROKRASTE ĉar estos tro malfrue, kiam la programeroj estos elektitaj.

AMASE ĉar nur multnombra reago povos influu decidon. Ni ne forgesu, ke televida programo ne indas por dek da personoj.

Bonvolu proponi tion afable per individua aŭ per kolektiva letero, kiun ankaŭ amikoj de Esperanto povos subskribi. Uzu preferinde la francan, germanan aŭ anglan (eĉ malbone); tamen bonvenos leteroj skribitaj ankaŭ en aliaj eŭropaj lingvoj.

Diskonigu per bultenoj, cirkuleroj, fotokopioj, ktp. Niaj leteroj inundu la labortablon de la RTL-Direktoro,

Villa Louigny,
 LUXEMBOURG

P.S. Neniu vera samideano rifuzos kunlabori!

La venonta numero aperos komence de septembro.

En ĝi vi trovos multajn tekstojn, kiuj ne povis aperi en tiu ĉi numero pro lok-manko (por ŝpari afrankon la red. nepre ne volis, ke la julia numero superu 50-gramojn...). Sed la septembra ja rajtos! Ĝis la...!



LINGVAJ ANGULOJ :

PRI OFTAJ ERAROJ

En esperantaj tekstoj mi ofte legis :

1. la adjektivon "korekta" en la senco de ĝusta, laŭregula, regulkonforma. Ĝi estas komprenebla de kelkaj eŭroplingvanoj sed ne de ĉiuj, ĉar en esperanto tiu uzo estas ne ĝusta (laŭ PIV : evitenda). Mi mem iam kulpis tiun evitendan uzon .

2. la verbon "havigi" kun rekta objekto, sed sen ia nereкта komplemento. Tiel oni scias, kio estas havigata, sed oni ne scias al kiu (kiu estos la havonto). Fakte tiu misa uzo estas verŝajne influata de la angla "to get", sed en esperanto oni devas precizigi : havigi al si.

Por skribi, mi havigis al mi paperon kaj krajonon.

3. la esprimon "leĝo pri oferto kaj demando". Nu, tion komprenas francoj, angloj, hispanoj, eĉ germanoj (Nachfrage), sed ne italoj (richiesta) kaj certe ne ĉiuj alilingvaj esperantistoj. Oni devas diri : proponado kaj postulado (Zamenhof) aŭ ofertado kaj mendado (PIV).

Estus tre dezirinde, ke ĉiu verkanto zorge kontrolu per PV aŭ PIV ĉiun vorton, kiun li emas uzi, por ne fali en tiajn mispaŝojn.

Valo.

SOLVO de la KRUCVORTA ENIGMO aperinta en L! 54 :
Hor. : 1. RESPUBLIKO. 2. ESKADRO. ON. 3. EKIPO. KART. 4. MA. IRAUM.
5. EPILEPSIUL. 6. RABI. ITALO. 7. IAMA. NEG. 8. EKSR. RITMI. 9. MAKARON.
Vert.: 1. REEMERĜEM. 2. ESKAPA. 3. SKI. IBISK. 4. PAPILIARA. 5. UDORE.
6. BR. APIARO. 7. LOKUST. 8. AMIANT. 9. KOR. ULEM. 10. ONTOLOGIO.
